Dua informilo

50a Internacia Seminario (IS) en Wewelsburg

27a de decembro 2006 – 3a de januaro 2005

Kiel atingi la ejon

Se vi venas trajne

Veturu ĝis *Paderborn Hbf* (la ĉefstacidomo). Eliru je la ĉefa elirejo, kaj tuj turniĝu dekstren. Pluiru, kaj vi venos al la centra busstacio. Tie vi trovu la buskajon 10 – ĝi estas iom kaŝita, ne paralele al la kajoj 1 – 9, sed aparte, plej for de la stacidomo. De tie vi veturos per la buslinio 460, direkte al *Flughafen Paderborn/Lippstadt*, ĝis *Wewelsburg Schule,* kie vi trovos indikilojn al la kastelo. Jen la veturtempoj de la busoj la 27an de decembro ekde 13:00:

Paderborn	ek	13:03	14:23	15:29	16:23	16:53	17:53	18:53	20:23	22:54
Wewelsburg	al	13:27	14:47	15:53	16:47	17:17	18:17	19:17	20:47	23:18

La sekva buso ekas 6:33 matene, do ne maltrafu la lastan. (Aŭ uzu taksion, tiuj atendas ĉe la stacidomo.)

Se vi venas aviadile

... al la flughaveno *Paderborn/Lippstadt*, uzu buson 460 (direkte al *Paderborn Hbf*), kaj eliru je *Wewelsburg Schule.* De tie sekvu la indikilojn.

... al flughaveno *Dortmund*, uzu buson de tie al *Holzwickede*, de tie trajnon al *Soest* (parolu *Zost*), de tie trajnon al Paderborn (Hbf). Sekvu la indikojn ĉe **trajne.**

Se vi venas aŭte

Uzu la aŭtoŝoseon A 44 ĝis la elveturejo *Büren* aŭ *Wünnenberg-Haaren*. De tie sekvu la ŝildojn ĝis *Wewelsburg*. Alveninte en la vilaĝo, sekvu la indikojn pri *Burg* aŭ niajn esperantajn indikilojn.

Vi rajtas eniri la kastelan korton per aŭto nur mallonge por elpaki viajn pakaĵojn – poste bonvolu parku ĝin ekstere, kie estas sufiĉe multaj parkejoj.

Kiam alveni?

La akceptado komenciĝos je la 14a horo. Prefere ne alvenu multe pli frue, se vi ne estas membro de la organiza teamo, por ne tro malhelpi tiujn fari ilian laboron.

Sed ankaŭ ne venu tro malfrue vespere, ĉar alikaze vi maltrafos la unuan vespermanĝon, la solenan malfermon, la Interkonan Vesperon (gvidita de la fama artisto JoMo) kaj la koncerton de Esperanto-Desperado.

Kion kunporti?

Jen ideoj, kion indas kunporti:

- naĝkostumoj (estos ekskurso al naĝejo)
- mezepokecaj vestaĵoj por la silvestra balo (vidu anoncon)
- ludoj (por uzo en la ludejo)
- kantoj
- muzikiloj (por la *muzika marmelado* kaj ankaŭ aliaj amuzadoj) – eble vi eĉ povos kontribui al la (klasikeca) novjara koncerto – kontaktu Aneta.Ubik@web.de
- vendaĵoj (se vi havas ion bonan por vendi)
- aĵoj por la senpaga vendejo (vidu la anoncon)
- fotoj de antaŭaj IS-oj (prefere la plej fruajn, kiujn vi havas) por krei ekspozicion, okaze de nia jubileo
- kulinarajn specialaĵojn (prefere tiajn, kiuj bezonas nek fridujon nek kuiradon) – vidu la anoncon pri IKF
- Se vi estas memzorganto, kunportu dorm-matracon kaj -sakon, kuirilojn (se vi volas kuiri), manĝaĵojn (se vi ne volas aĉeti ilin surloke) ktp.
- Se vi ne estas memzorganto, **ne** kunportu matracon, dormsakon aŭ litolaĵon.

Programo

Jen la plej interesaj partoj de la programo:

- ekskursoj
  - al la urbo Paderborn (29a de decembro)
  - al naĝejo (2a de januaro)
  - al lernejo kun Waldorf-pedagogio
- Tema programo – interesaj prelegoj pri junulara agado kaj pri-junulara laboro
- Movada programo - Aktivula Trejnado de TEJO gvidata de Ilja de Coster kaj ILEI-seminario *Flugiloj de malfacila vento* gvidata de Zsófia Kóródy. Pliaj informoj troviĝas en la retpaĝaro.
- Ekzameno pri meza kapableco de Esperanto de la Germana Esperanto-Instituto, vidu pliajn detalojn retpaĝe. (Se vi jam nun certas ke vi volas partopreni, bonvolu anonci tion per retpoŝto.)
- koncertoj de
  - Dolchamar (30a de decembro)
  - Esperanto-Desperado (en nova konsisto) (27a de decembro)
  - JoMo (28a de decembro)
  - Kadakar (29a de decembro)
  - Martin Wiese (29a de decembro)
  - DĴ Roĝer Borĝes (29a de decembro)
- Internacia Vespero (2a de januaro)
- Silvestra balo (31a de decembro)
- Novjara koncerto (1a de januaro)
- Jubilea festo (30a de decembro)

Anoncoj

IKF – Internacia Kulinara Festivalo

Dum la 50a IS en Wewelsburg okazos la unua IKF. La partoprenantoj el la tuta mondo kunportu lokajn kulinarajn specialaĵojn (dolĉaĵojn, trinkaĵojn ktp.) kaj prezentu ilin dum la postagmezo de la 30a de Decembro. Ĉiuj estas invititaj partopreni kaj kontribui al la festo!

Silvestra Balo

La temo de la silvestra balo estas – kongrue al la ejo – *mezepoko*. Do kunportu taŭgan veston, estos kostumkonkurso. Ankaŭ laŭtema muziko estas bonvena.

Senpaga vendejo

Karaj,

ĉu ankaŭ vi foje revas, ke vi povu iri al vendejo kaj kunporti kion ajn vi volas sen devo pagi? Via revo povus nun iĝi vero…

En la 50a IS en Wewelsburg ni planas havi tablon, kien ĉiuj partoprenantoj povos meti aĵojn kiujn ili ne plu bezonas, sed kiujn eble iu alia ŝatus havi. Aliaj partoprenantoj povas butikumi kaj aĉeti senkoste, do simple kunporti, tiujn aĵojn, se ili volas.

Reguloj:

- La aĵoj ne estu neuzeblaj aŭ rubaj, kaj ne tro pezaj (ĉiuj havas jam pakaĵojn)
- Oni ankaŭ rajtas aĉeti kvankam oni ne mem metis aĵojn
- Se fine de la IS viaj aĵoj ne estis aĉetitaj, bonvolu mem zorgi pri ili (kunporti aŭ forĵeti)

Ne hezitu do kunporti kelkajn nepezajn aĵojn kiuj jam polviĝis pro neuziĝo kaj feliĉigu iun alian!

Helpantoj por trinkejo

Karaj, ĉu vi ŝatas bonan etoson en la trinkejo? Ĉu vi estas helpema? Se jes, vi bonege taŭgas por helpi en la trinkejo dum IS (kaj por vendi trinkaĵojn kaj por krei etoson).

Bonvolu kontaktu la trinkejo-prizorganton: andreas.diemel@esperanto.de.

Adresoj kaj telefonnumeroj

Junulargastejo:	*Asocia oficejo (ne dum IS):*	*Administrado:*
Jugendherberge Wewelsburg Burgwall 17 33142 Büren	Deutsche Esperanto-Jugend e.V. Einbecker Straße 36 10317 Berlin	Julia Noe August-Bebel-Straße 42/42 15234 Frankfurt/Oder
+49 2955 6155 (ili ne jam parolas Esperanton)	+49 30 42857899 bero@esperanto.de	+49 335 2802501 is.admin@esperanto.de

IS-poŝtelefono (nur dum IS, por urĝaj kazoj):	*Publika (monera) telefono en la junulargastejo:*	*(Ĉi tie povus aperi via varbaĵo.)*
+49 179 4476356	+49 2955 16079	